Laŭzana Esperanto-Societo
Aprilo 2019 - no 4

# Laŭzana informilo

*Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano*

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 6-an de majo *Decidota*
- Sa, la 15-an de junio *Ekskurso*
- Lu, la 2-an de septembro *Decidota*
- Lu, la 7-an de oktobro *Decidota*

## Lunde, la 1-an de aprilo, je la 20-a

### Alportu viajn ŝercojn. Ni kune ridos pri amuzaĵoj.

Serĉu surrete ŝercarojn en esperanto aŭ traduku esperante kelkajn kiujn vi jam konas
Elektu 5 el la plej ridigantaj. Ni plezure aŭdos vin rakonti ilin.

## La Prezidantino nin alparolas . . .

Ekde pli ol dek jaroj mi partoprenas la "Festivalon pri Aziaj filmoj" (FICA) en Vesoul - Francio. Dum tiu vizito, ni vidas multege da vizaĝoj, pejzaĝoj, ni aŭdas diversajn lingvojn kaj malkovras malsimilajn skribojn. Azie preskaŭ ĉiu lingvo posedas sian propran skribaĵon. Pro tio mi ekinteresiĝis pri la strukturo de diversaj lingvoj kaj aŭdis pri konstruitaj lingvoj, kiel Esperanto.

Mi rete informis min, aĉetis libron pri la gramatikaĵo. Mia unua ĉefa celo estis kontroli ĉu eblas paroli pere de konstruita lingvo.

Dank'al Francisko mi partoprenis informkunvenon. Samtempe mi aŭdis pri la trasiberia esperanto-karavano kaj tuj decidis sekvi esperantan kurson.

Mi konfesas ke dum unu jaro mi ne multe praktikis la lingvon. Do, komence de la vojaĝo en Siberio mi apenaŭ povis kompreni kaj malfacile paroli. Dum la ferioj en Rusio mi ege studis, provis paroli kun la aliaj esperantistoj. Marborde en Vladivostoko, dum la lasta vespero, mi surprizis min paroli - malrapide - pri religio, filozofio, alternativaj medicinoj, rilatoj inter homoj, ktp.

Nun, uzante preskaŭ ĉiutage Esperanton, mi kapablas rapide paroli kaj kuraĝas verki tiun ĉi unuan tekston.

Mi ŝatas pli grandigi mian vortprovizon per legado. Espereble aliaj same deziras.

Kiam oni proponis al mi kanditatiĝi kiel prezidanto de LES, mi unue pripensis kiel kontribui al la vivo de nia societo. Mi pensas ke ne nur la estraro gravas sed ĉefe la deziroj de la membroj.

Mi rimarkis ke dum niaj monataj kunsidoj, ni ne vere konas unu la alian. Certe pli bone helpus nin konatiĝi la babiladaj rondoj. Sed kiel scii kial unu eklernis esperanton kaj ŝatas uzi ĝin kaj kiel la lingvo faciligas la ĉiutagan vivon de alia.

Kiel Prezidantino, mi ŝatus uzi tiun informilon ankaŭ por faciligi la kontaktojn kun aliaj kluboj.

Mi kontaktos vin, karajn membrojn, en hazarda sinsekvo. Viaj respondoj al miaj demandoj kontribuos al la enhavo de tiu rubriko. Kiel vi eklernis esperanton, kiel vi ĝin uzas en via vivo, ĉu vi aktivas en la movado kaj pli konkrete: kion vi atendas de via komitato kaj kiom vi mem kontribuos al nia societo.

***Vivu LES! Vivu esperanto!***

Maryse

## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin, ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

### Komitato 2019

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Petermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas

**La babiladaj rondoj je la 19-a**


**Ambaŭgrupe:**
**Sankta Ve, la 19-an de aprilo**
M-Antoinette k. Knud invitos nin
en av. des Alpes 150, Montreux.
021 961 38 56 / 079 210 97 75

*doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd*
**Okcidente:**
**la 12-an de aprilo**
ĉe Gilbert Darbellay
ch. de l'Orme 6, Morrens
021 732 23 22 / 079 315 14 13

*doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6*
**Oriente:**
**la 26-an de aprilo** ĉe Clea Robin
ch. Culaz 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

**La komisiono filma**
okazos ma, la 19-an de marto je la 17-a ĉe Maryse Tissot
route de St-Légier 20a, Vevey
079 405 71 76.

**Esperanta kurso** (076 369 29 17)
je la 17h30 en la *Maison du Désert*.
Dua leciono: ĵa, la 21-an de marto
Legado: ĵa, la 28-an de marto



Rekonstruu krucvortenigmon anstataŭigante ĉium mumeron per litero.

## Karlo de Edmond Privat — tria ĉapitro: *La servistino*

La geavoj de Karlo konservis tre longe unu servistinon, kiun ĉiuj en la familio tre amis pro ŝia fideleco kaj diskreteco. Kiam la juna Sinjoro Davis edziĝis, la servistino iris en la novan hejmon por ĉion aranĝi. La juna edzino tiom plaĉis al ŝi, ke ŝi tie restis; kaj post la naskiĝo de Karlo, ŝi decidis, ke ŝi neniam foriros.

Ŝia nomo estis Anjo. Ŝi havis pintan nazon kun du malgrandaj grizbluaj okuloj kaj vangoj ĉiam tre ruĝaj, kiel pomoj. Sian blankan kufon ŝi preskaŭ neniam demetis, sed ofte okazis, ke Karlo fortiris ĝin por vidi la koloron de ŝiaj haroj. Ĉiufoje li ricevis pro tio vangofrapon kaj tuj poste kison.

En la domo Anjo faris ĉion; ŝi estis samtempe kuiristino kaj ĉambristino, sed la domo estis tiel malgranda, ke ŝi facile plenumis ambaŭ taskojn. Sinjorino Davis ŝin ofte helpis kaj faris ĉiujn kudrolaborojn. Anjo sentis en si tre grandan admiron al la juna dommastrino pro ŝia granda delikateco en ĉio.


Kelkafoje Karlo ricevis permeson iri frumatene al la legomvendejo kun Anjo. Ŝi portis du grandajn korbojn kaj li malpezan retsakon. Post dekkvinminuta marŝado ili alvenis al la publika placo. Multaj ĉevaloj kaj veturiloj staris apud la trotuaroj. En la mezo de la placo, ĉirkaŭ la monumenta fontano, sidis la gevendistoj kun siaj tabloj kaj korbegoj plenaj je brasikoj, terpomoj, fromaĝoj, fruktoj ĉiuspecaj. Anjo diskutadis kun multaj virinoj kaj fine aĉetis diversajn legomojn kaj grandan pecon da butero. Kelkafoje ŝi metis ion en la retsakon de Karlo. Poste tre rapide ili hejmen revenis.

Kelkafoje Karlo helpis Anjon meti la telerojn sur la tablon. La forkojn, kulerojn kaj tranĉilojn li ankaŭ alportis, sed neniam la glasojn, ĉar Anjo opiniis la aferon tro danĝera.

Iam li rompis tason, ĉar li provis porti tri samtempe. Alkuris Anjo ĉe la bruo... "Estas nenio," ekkriis Karlo, "mi ne vundiĝis." Anjo lin longe riproĉis, sed Karlo opiniis, ke estus multe pli saĝe, se ŝi irus tuj serĉi alian tason.

Kun Karlo, Anjo estis ĉiam gaja kaj ŝercema; sed kun Helenjo, ŝi estis multe pli dolĉa kaj eĉ ŝajnis iom malĝoja rigardante ŝin. Ŝi prenis ŝin delikate en siaj brakoj kaj movis la kapon penseme. Ĉiuj same ŝajnis melankolie dolĉiĝi apud Helenjo.

Karlo tre amis sian fratineton, sed ne kuraĝis multe ludi kun ŝi, ĉar ŝi ŝajnis timi la bruon kaj tre ofte ekploris. Li opiniis, ke la knabinoj estas delikataj estaĵoj, kiuj bezonas multe da zorgoj.



## Luminesk' 2018 estas silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

La jarfina aranĝo okazis en Germanio en la JUFA-hotelo proksime al la urbo Bonn. Partoprenis ĝin 65 geesperantistoj el dek landoj, inter kiuj ankaŭ estrarano kaj ĝenerala direktoro de UEA. Dum la semajno ni aŭskultis diversajn interesajn prelegojn.



*Dieter Rooke* parolis pri la historio de la Esperanto-literaturo kaj gvidis la internacian ĥoron. Okazis kvizo por la plej saĝa homo. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjuo. Dum la ekskurso, ili vizitis la iaman naskiĝdomon de la mondkonata komponisto Ludwig van Beethoven.

Ĉiu Esperanto-renkontiĝo havas sian celgrupon. Kelkaj aranĝoj alparolas familiojn kun infanoj. Aliaj renkontiĝoj alparolas junulojn ĝis 30. Luminesk alparolas junajn plenkreskulojn kaj plenkreskulojn. Post la ŝanĝo en la oferto de renkontiĝoj tio nun estas la unuura (granda) en mezeŭropo kun tiu celgrupo dum silvestro.



*Nia nova Prezidantino, Maryse Tissot, Patrick Haerick, nia belga amiko, kaj ankaŭ Barbara kaj Daniel Mühlemann partoprenis la renkontiĝon.*